

# B U L T E N O

de ESPERANTISTA KLUBO en BRNO

Rok 2000

Zpravodaj Klubu esperantistů v Brně

**Příprava stého výročí klubu.** V roce 1901 vznikl v Brně "První spolek rakouských esperantistů", z něhož se později vyvinul náš klub. Esperanto samozřejmě existovalo v Brně a jiných místech již dříve, ale brněnská organizace na to dostala jako první úřední razítko. Sté výročí oslavíme setkáním v **sobotu 26. května 2001**. Připravili jsme i pohlednici a další materiály, které esperantistům i veřejnosti připomenou stoletou existenci esperantského hnutí na našem území.

**85. světový kongres esperanta** se letos konal v izraelském Tel-Avivu za účasti 1212 lidí z celého světa. Hlavní kongresové téma "Jazyk a kultura míru" bylo zvláště aktuální v místě střetu tří náboženských kultur. Pozdravné telegramy poslali **Kofi Annan** (OSN), **Koičiro Matsuura** (UNESCO), **Shimon Peres** (měl záštitu nad kongresem jako ministr pro spolupráci), **Ron Chundai** a **Natan Wolloch** (primátor Tel-Avivu a jeho náměstek), **Prof. Naomi Chazan** (předseda izraelského parlamentu), **Josi Sarid** (exministr kultury) a **dr. L.C.Zaleski-Zamenhof** (vnuk autora esperanta). V rámci kongresu proběhly nejen přednášky ke kongresovému tématu a židovské kultuře (např. *Co a kdo je žid, Historie židů dle Josepha Flavia, Židovský humor*), ale také zasedání jednotlivých esperantských organizací (nevidomí, spisovatelé, novináři, ekonomové, africké hnutí atd.), uskutečnily se četné zájezdy po Izraeli, kulturní pořady a rychlokurzy hebrejštiny a arabštiny pro seznámení se s oběma jazyky a jejich kulturou. Příští kongres bude v Záhřebu (připravuje se autokarový zájezd).

**Vladimír Váňa a Jiří Karen.** Na jaře postihly českou esperantskou literaturu dvě ztráty: 25. 3. v Plzni zemřel esperantský spisovatel a překladatel (*Romeo, Julie a tma, Osudy dobrého vojáka Švejka*) a nejlepší esperantský filatelista (ještě dva týdny před smrtí získal v Brně pozlacenou medaili) Vladimír Váňa (nar. 1932) a 30.4. zesnul v Praze básník Jiří Karen, vlastním jménem Ladislav Podmele (nar. 1920), týden před vydáním poslední knihy *Výpravy dona Quijota do hlubin lidské duše*. Získal si významné postavení v české literatuře, psal a překládal i v esperantu a svou esperantskou činnost zmiňuje také ve svých životopisných datech v českých encyklopediích.

**Životní jubileum Aleny Růžičkové-Pavlínové.** Členka našeho klubu a čestná členka Českého esperantského svazu, herečka paní Alena Růžičková-Pavlínová oslavila 8. července své 90. narozeniny v Domově důchodců na Věstonické č. 1, kde ji pravidelně navštěvují členové klubu. Alena Růžičková vytvořila nespočet rolí v brněnských divadlech, vyučovala na JAMU, je též čestnou členkou Klubu přátel Mahenovy činohry. Svým hereckým uměním přispívala i ke klubovým a svazovým programům

**Jaromír Šikula.** Bohužel na jaře přišla i smutná zpráva, že 29. května navždy odešel v den svých 76. narozenin **Doc. RNDr. MVDr. h.c Ing. Jaromír Šikula**, dlouholetý pedagog Veterinární a farmaceutické univerzity v Brně, člen našeho klubu, který často reprezentoval při slavnostních příležitostech. Do klubového programu přispíval přednáškami o botanice a zdravotnictví, v podobné roli vystupoval občas i v televizi, neboť byl ve svém oboru významnou osobností evropského formátu.

**Jarmila Malá.** Po prázdninách pravidelné návštěvníky klubových schůzek podobně zasáhla zpráva o úmrtí paní Jarmily Malé (nar. 1919), která téměř žádnou schůzku nevynechala.

**Dílo Roberta Hliněnského.** Členka našeho klubu, paní Eva Hliněnská, vydala knihu o díle svého manžela, významného brněnského malíře Roberta Hliněnského (1908-1979). Kniha formátu 21 x 26 cm na 70 stranách reprodukuje malířovu fotografii, 10 kreseb, 45 barevných maleb, v textové části nás seznamuje s umělcovým životopisem, soupisem výstav, katalogů, článků. Kniha stojí 300 Kč u autorky.

**Program.** Vzhledem ke zvýšeným poplatkům za poštovné jsme omezili klubový věstník na jedno číslo, avšak kvůli historii uvádíme celoroční program, který je jinak možno pravidelně sledovat v měsíčníku *KAM v Brně za kulturou*. (První tři měsíce byly zveřejněny v Bultenu 2/1999.)

### **Aprilo**

- |     |                |  |
|-----|----------------|--|
| 5.  | J. Werner:     | Civitano en ekonomie globaligita mondo |
| 12. | V. Podhradská: | Interesa natura fenomeno               |
| 19. | M. Picková:    | Skokovy 2000                           |
| 26. | M. Lorková:    | Gaja aprilo                            |

### **Majo**

- |     |              |   |
|-----|--------------|---|
| 3.  | Z. Hršel:    | Ellernu 3                               |
| 10. | O. Fischer:  | Dombestaj parazitaj                     |
| 17. | M. Malovec:  | Faraono Ramseso 2                       |
| 24. | J. Handlová: | Kongreslando Israelo (kun diapozitivaj) |
| 31. | M. Lorková:  | Patrino Teresa 3                        |

### **Junio**

- |     |                |                        |
|-----|----------------|------------------------|
| 7.  | M. Picková:    | Prof. Růžena Vacková   |
| 14. | Z. Hršel:      | Ellernu 4              |
| 21. | M. Lorková:    | Kvindekjaraj rememoroj |
| 28. | V. Podhradská: | Feriaj ofertoj         |

### **Septembro**

- |     |                |                                     |
|-----|----------------|-------------------------------------|
| 6.  | Z. Hršel:      | Ellerni = aktivi                    |
| 13. | V. Podhradská: | Spertoj el Somera Esperanto-Tendaro |
| 20. | M. Malovec:    | Kruckavaliroj                       |
| 27. | M. Picková:    | 53a IKUE-kongreso en Rimini         |

### **Oktoebro**

- |     |                |                            |
|-----|----------------|----------------------------|
| 4.  | J. Handlová:   | Japanio en bildoj          |
| 11. | M. Lorková:    | Prudento neniam superfluas |
| 18. | Z. Hršel:      | Ellernu 5                  |
| 25. | M. Klimentová: | Nutrado kaj sangogrupoj    |

### **Novembro**

- |    |              |                        |
|----|--------------|------------------------|
| 1. | M. Malovec:  | Ni laboras pri gazetoj |
| 8. | J. Handlová: | Seminario en Skokovy   |

- |                    |                                   |
|--------------------|-----------------------------------|
| 15. Z. Hršel:      | Ellernu speciale                  |
| 22. V. Podhradská: | Temo sekreta                      |
| 29. M. Malovec:    | Esperanto por scienco kaj tekniko |

### **Decembro**

- |                |                      |
|----------------|----------------------|
| 6. M. Lorková: | Venas Sankta Nikolao |
| 13. Z. Hršel:  | Ni ellernis          |

### **JARO 2001**

#### **Januaro**

- |                    |                              |
|--------------------|------------------------------|
| 3. Z. Hršel:       | Gaje en la jubilean jaron    |
| 10. O. Fischer:    | Karaktoj de aziaj skriboj    |
| 17. V. Podhradská: | Nia centjara jubileo         |
| 24. M. Lorková:    | Prudento neniam superfluas 2 |
| 31. Z. Hršel:      | Vespero kun anekdotoj        |

#### **Februaro**

- |                  |                              |
|------------------|------------------------------|
| 7. V. Podhradská | Kviza vespero                |
| 14. M. Malovec   | Gaja gramatiko               |
| 21. J. Handlová: | Kiel vi pasigas libertempon? |
| 28. klub         | Výroční členská schůze       |

#### **Marto 2001**

- |                        |                                 |
|------------------------|---------------------------------|
| 7.3. Marta Lorková:    | Tion vi ne legis                |
| 14.3. Věra Podhradská: | Cent jaroj de Esperanto en Brno |
| 21.3. Mir. Malovec:    | Faraono malkovrita              |
| 28.3. Mgr. Z. Hršel:   | Ellernu!                        |

#### **Aprilo**

- |                      |                    |
|----------------------|--------------------|
| 4.4. Mir. Malovec:   | Faraono revenas    |
| 11.4. M. Lorková:    | Nia Pasko          |
| 18.4. V. Podhradská: | Rakontu anekdotojn |
| 25.4. Mgr. Z. Hršel: | Iom da historio    |

### **Členské příspěvky Českému esperantskému svazu a našemu klubu**

Jak jsme vám sdělili již minule, změnili jsme peněžní ústav pro vedení našeho účtu. Tím se také poněkud změnil způsob účtování. Ve výpise nám banka neuvádí jméno plátce, částky členských příspěvků jsou stejné, je proto zapotřebí, abyste při úhradách uváděli **jako variabilní symbol** své členské číslo, pod kterým vás vedeme v evidenci (máte ho uvedeno v pravé horní části adresního štítku Starta). Výše členských příspěvků na rok 2001 zůstává nezměněna, tedy:

kategorie A (výdělečně činní): 250,- Kč (= 200,- ČES + 50,- EK Brno)

kategorie B (studenti, důchodci): 140,- Kč (= 100,- ČES + 40,- EK Brno)

kategorie D: 90,- Kč (z toho 50 Kč pro ČES, 40 Kč pro EK Brno)

Budeme vám velmi vděční, když svůj příspěvek uhradíte co nejdříve. Umožníte nám tak využít slevy, která platí pro kluby a místní skupiny, které poukážou na svazové příspěvky do konce roku.

### **Josef Vondroušek (1904-1995)**

La 6-an de decembro 2000 pasis 5 jaroj de la momento, kiam forlasis nin por ĉiam nia karmemora s-ano Josef Vondroušek, honora membro de UEA kaj ĈEA, honora prezidanto de la klubo, eminenta tradukanto el la ĉeĥa literaturo, en sia 91-a jaro (li naskiĝis la 1-an de decembro 1904). Ni ĝuu por lia memoro iom el lia traduk-arto, dediĉita al lia amo - violonludado.

Alois Jirásek

### **Pri Dalibor el Kozojedy**

Dum longaj jaroj estis silente kaj triste en la kastelo de sankta Venceslao<sup>1</sup>. Ĝia ĉirkaŭaĵo dezertiĝis dum la granda tempesto de la husanaj militoj, la katedralo de sankta Vito estis disbatita kaj la reĝaj ĉambroj, de Karolo la IV-a superbe instalitaj, kadukiĝis pli kaj pli. De temp' al tempo kaj ne por longe, ili viviĝis, kiam la reĝo de malsupre, de malnova urbo, tien el sia kortego alvenis.

Li alvenis, tempeton pasigis, sed ne restis ankaŭ la juna Ladislao Postnaskito kaj lia glora posteulo reĝo Georgo, benata, rezidis pli multe malsupre en la urbo. Post Georgo dum la unuaj tagoj Vladislao la II-a Jagelona. Sed dum ĉi tiu estiĝis granda ŝanĝo.

Post dek du jaroj de sia regado li ŝanĝis sian rezidejon. Subite ŝajnis al li, ke li ne estas sufiĉe sekurigita en sia Malnovurba kortego, ĉe kiu li igis konstrui multekostan arte kaj belege ornamitan turon<sup>2</sup>. Kaj li revenis en la malnovegan rezidejon de la ĉeĥaj reĝoj sur Hradčany, kaj igis renovigi kaj reinstali ĉion, kio dezertiĝis. Beneš el Louny konstruis tie grandan mirindan halon<sup>3</sup> kaj ankaŭ en la sama tempo kapelon por la reĝo en la katedralo de sankta Vito dekstre de la granda altaro, ornamitan per miriga ŝtonskulptaĵo.

La reĝo ankaŭ igis ornami la nudajn katedralajn murojn per drapiraĵoj, ĉefe en la sanktvenceslaoa kapelo, kaj per liaj zorgado kaj kostoj ekbrilis la ĉambroj en la reĝa palaco denove pro superbo de tapetoj kaj bildoj. En unu el ili pendis nur bildoj de la ĉeĥaj princoj kaj reĝoj.

Sed ne nur la ornamo estis grava por la reĝo, ankaŭ tio, ke la kastelo estu pli bone fortikigita. Tiel laŭ lia ordono oni firmigis la bastionmurojn, pliprofundigis fosaĵojn, altigis remparojn, kie tio necesis, kaj sur turo Mihulka oni faris tre altan tegmenton kaj kovris ĝin per emajlitaj brikoj, super kiuj sur turglobo blankis kaj brilis arĝentizita leono.

Nelonge poste igis reĝo Vladislao konstrui novan, rondan turon post domo de la plej supera burgrafo, pli proksime al la malantaŭa pordego. Oni konstruis ĝin super la Cervo-fosaĵo por protekto de la bastiono, sed ankaŭ kiel loĝejon, malgajan loĝejon. Oni faris tie tri malliberejojn super si. La plej malsupra el ili estis sub la tero, sen fenestroj, sen lumo, sen pordo. Arestito estis malsuprenigota per ŝnuro tra truo en la planko de la meza malliberejo.

La turon oni finkonstruis, sed arestiton oni ne havis, nek por la plej supra, leĝera, nek por la ceteraj. Kaj tial la turo provizore estis sen nomo, ĉar tiun ĝi ricevus post arestito, kiu la unua transpaŝus ĝian sojlon. Sed longe ĝi ne restis sennoma.

Tiam okazadis multaj evidentaj maljustaĵoj al la kampara popolo. Nobeloj kaj vladikoj opresis ĝin per novaj, senmezuraj servutoj. Kelkie oni ne plu povis elteni tian opresadon. Tial oni ĉion forlasadis, oni fuĝis el siaj bienoj en arbarojn, en aliajn regionojn kaj komencis ŝteli, rabi kaj fari aliajn krimojn. Aliaj ribelis kontraŭ siaj mastroj.

Tiel ekribelis kampanoj kontraŭ Adam Ploskovský el Drahonice en la regiono de Litoměřice, ĉar li estis kruela je ili, elpensadis kontraŭ ili maljustajn servutojn kaj diversajn kaj grandajn subpremadojn. Ili ekatakis lian fortikaĵon, konkeris ĝiajn valojn, elrompis pordegon, kaj kiam ilia kruela vladiko tie kuraĝe defendis sin, ili vundis lin kaj kaptis. Por ke li konservu sian gorĝon, li submetiĝis al ilia volo, kaj per sia honoro kaj kredo skribe li liberlasis ilin el sia potenco kaj promesis, ke li neniel procesos kontraŭ ili.

Tiam en la najbareco de vladiko Ploskovský vivis en sia fortikaĵo juna etnobelo Dalibor el Kozojedy, viro el antikva familio, kies antaŭulo heroe batalis kune kun reĝo Johano apud Crécy kaj tie ankaŭ kun li pereis. Al tiu Dalibor amasvenis la liberigitaj kampuloj de Adamo Ploskovský kaj kaj ĝoje anoncis, ke Ploskov-fortikaĵo estas en ilia potenco, kaj petis, ke Dalibor ekprenu ĝin, ke ili ŝate subiĝos al li kaj jam subiĝas kiel al sia superulo, ke tiel ili faras propra-vole kaj ŝate, ĉar ili scias, ke Dalibor estos al ili mastro favora.

Ili konis lin ja kaj sciis, ke Dalibor el Kozojedy ĉiam estis al siaj subuloj bona kaj kompata, jes, ke ne unu povrulon el alia bienteritorio li ekprotektis kaj per sia propeto ankaŭ aliel helpis.

Vladiko Dalibor ne rifuzis ilin; li akceptis, kion ili proponis al li, aŭdinte, ke pri ĉio ili havas skribateston de la estinta mastro. Sed tiu, kiam li saviĝis kaj resaniĝis, repostulis sian bienaron. Insiste li invokis helpon de la registaro, kaj la landhetmanoj opiniante faron de Dalibor ŝtelo kaj agon de la Ploskov-kampuloj ribelo, kolektis landodefendon de Litoměřice-regiono, soldatkapablajn homojn de la tuta nobelaro el tiuj regionoj kaj civitanojn el Litoměřice.

Tiu granda aro ekatakis la ribeliĝintajn kampulojn; multajn ili mortigis, kaptis kaj kruele punis kaj ankaŭ Daliboron, ilian aliancanon, ili kaptis. Tiel la juna defendanto de la subpremata popolo estis katenigita. En katenoj oni veturigis lin al Prago kaj ĵetis en la mezan malliberejon en la nova, ronda turo post la burgrafa domo super Cervo-foso.

Dalibor kiel la unua arestito transpaŝis ĝian sojlon kaj tial laŭ li ĝi estis nomita Daliborka. En la kastelo kaj la tuta Prago oni parolis pri la juna etnobelo ankaŭ tial, ĉar li estis la unua arestito en la nova turo, kaj pro la kaŭzo, por kiu li tien venis. Orgojlaj nobeloj ĝojis kaj deziris tion al li, sed la popolo lin bedaŭris.

Tie li tristis kaj malgajis. En la volba karcero dikmura kaj etfenestra estis nun lia regoteritorio. Hejme el sia fortikaĵo li rigardadis la vastan, belan regionon; nun apenaŭ li vidis strion de la firmamento kaj sub la tero parton de la profunda, herbokovrita fosaĵo. La foliaro jam ŝanĝis kolorojn al la ora, ruĝa; trista aŭtuno estis komenciĝanta.

Silento en la turo kaj silento ĉirkaŭe. La birdoj silentiĝis, nur vento fajfis kaj skuis vepron kaj arbojn. La folioj defaladis, nebuloj kuŝiĝadis en la profunda fosaĵo, vualis ĝin dum la frumatnaj tagiĝoj, pluvoj ĉiumomente muĝis kaj vipis la nudajn arbustojn kaj arbokronojn. Mallonga tago en la karcero estis longa kaj la longaj noktoj kvazaŭ senfinaj. Nostalgio kaj enuo turmentis la junan etnobelon.

Kaj li prizorgis al si violonon el la modesta monprovizo, kiun oni lasis al li por la nutraĵo<sup>4</sup>. Tuj kiam karcer-gardisto havigis al li la violonon, li komencis ekzerci la violonludon. Neniam li havis arĉon en la mano; nun preskaŭ li ne fordonis ĝin el la mano. Li mem lernis, ludis kaj ludis, enuo kurtiĝis, la tempo pli rapide pasis kaj la ludo mem estis ĉiam pli bona, arta, ĉarma.

Jam la karcer-gardisto kaj gardservistoj staradis post lia pordo kaj aŭskultis. Ne unu el la kastel-sinjoroj kaj oficistoj venis aŭskulti, kiel la etnobelo el Kozojedy ellernis en la karcero violoni. Jam en la urbo oni rakontis pri tio, jam oni venadis supren por konvinkiĝi: unue scivolemaj, poste nekredemaj Tomasoj. Ĉiutage alvenadis pli kaj pli da homoj, ĝis ofte granda homamaso staris kaj atendis apud la malantaŭa kastela pordego, ĉe ambaŭ vojoj, inter kiuj

etendiĝis tra la deklivo malsupren vinberejo de sankta Venceslao.

Jam estis printempo, kiam blovis milda vento de la suda flanko, kiam arbosuproj kaj branĉoj dehiskadis kaj floris, kiam Petřín kaj ĉiuj altaĵoj ĉirkaŭverdis, ankaŭ la Cervo-foso, tute sonanta per pepado de la dolĉa sono. Sed super la birda pepado pli bela estis, kiam aŭdiĝis el la ronda turo ĉarmega violon-voĉo.

Ĉiuj miregis kaj mirrigidiĝis, kiam ekvibris la molaj, dolĉaj, tristegaj sonoj el la dezerta, melankolia karcero.

Des pli ili emociis. Nostalgio kaj sopiro sonis en ili, kaj jam denove ili ŝanĝiĝis al konataj melodioj de la religiaj kantoj. Humilo, espero kaj peto de la trista koro blovis el ili. Alifoje ili sonoris per laika sonado, per eĥoj de la amkantoj kaj militaj kantoj.

Ne unufoje ludis Dalibor la malnovan melodion pri reĝo Johano, pri la juna Klimberk kaj Plichta el Žerotín, pri Bavor el Strakonice, pri ĉiuj ĉeĥaj nobeloj kaj etnobeloj, kiuj pereis kun sia reĝo apud Crécy, same kiel la praavo de la arestita muzikanto.

Praganoj emociaj aŭskultis apud la turo. Kaj ekvidinte foje, ke el la karcera fenestreto estas malsuprenigata maldelikata tolsaketo, eme kaj ŝate ili donadis, kion kiu ajn ĉe si havis, groŝojn kaj ankaŭ monerojn. Ĉiu opiniis, ke la etnobelo nutriĝas el la sia. Nun ili vidis, ke li malbone fartas, ke mizero venis al li. Nobela viro mem ne volis almozpeti tra la urbo kaj donacon en la karceron li ne ricevis. Li havis nenion, nur sian violonon.

Kaj kiam ajn poste li ekludis, kiam ajn la tolsaketon li malsuprenigis el la karcero, ĉiam plenigis ĝin al li tiuj, kiuj malsupre aŭskultadis, per mono, donacoj, por ke li ne malsatu kaj ne havu mankon de io. Ne unu kompatema urbanino, ne unu najbaro plibonfartigis lin: kuseneton sub la kapon ili sendis al li, litvestaĵon kaj manĝaĵon kaj ne unu kruĉon da trinkaĵo. Por tio li ludadis al la homamaso, kiam ĝi kunvenis apud la turo posttagmeze kaj dum la antaŭvesperiĝa tempo. Kun retenata spiro ili aŭskultadis, kaj disirante unuvoĉe ili asertis, ke tiel, kiel la juna etnobelo ludas neniun en Prago. Mallibero, mizero igis Daliboron violoni. Dumtage li ludis al la homoj, al si ofte dumnokte.

Kiam la reĝa palaco silentiĝis, malheliĝis, kiam la mita grizblua ombro altiĝis al la nokta ĉielo, kiam en la blanketa lumo de la luno silentiĝis arbustoj kaj arboj en Cervo-foso, vastiĝis el la mallumo de la ronda turo ĉarmaj sonoj de Dalibor-violono. Larmoj estis en la sonoj, sopiro pri libero kaj ekkrioj de kajero. Mildigon ili donis, sed ne liberon. Disinjoro estis alte, la reĝo malproksime kaj la nobeloj kompaton ne havis.

Longan tempon ili lasis la etnobelon el Kozojedy en la karcero, ĝis fine antaŭ la plena tribunalo ili agnoskis je la rajto kaj tiel pri ĝi verdiktis: Ke Dalibor el Kozojedy misrajte la forprenitan bienon akceptis kaŝ en ĝi loĝis; ke en tio malĝuste kaj malnoble li agis kontraŭ la rajto kaj ordo. Pro tiu sia malbona faro li perdu la gorĝon.

Tiel ili anoncis al li kaj neniel atentis, kiel li defendis sin, ke ili konsideru, kiu komencis, kaj la unua faradis la evidentan maljustaĵon kaj per tio ribeligis la popolon, ke li, Dalibor, nur la popolon defendis. Sed ĝuste ĉi tio estis ĉe ili kulpo kaj peko. Kaj tial ili ne ŝanĝis la verdikton; sed tagon kaj tempon de la ekzekuto ili sekretigis. Tiunokte antaŭ ĝi aŭdiĝis voĉo de Dalibor-violono lastfoje. El profundo de la dezerta karcero vibris kaj sonis en la silentan nokton la lasta konsolo, la lasta lumo en la mallumoj de la aflikto kaj estis formortanta super la Cervo-foso en la lunlumo. Kiam praganoj la postan tagon denove venis al la nova turo, ili ne ekvidis la tolsaketon sur krado de la karcero de Dalibor. Kaj la turo estis silenta, muta. Kiam ili demandis, ĉu Dalabor malsanas, aŭ kio estas al li, la karcergardisto anoncis, ke jam bone li fartas, ĉar matene, antaŭ la esplanado li estis ekzekutita.

"Sed antaŭ ol li elpaŝis el la karcero," diris lia gardisto, "li deprenis la violonon desur la muro, rigardis ĝin, adiaŭis ĝin. Poste kuraĝe li iris al la loko. Kaj li ekgenuis kaj klinis la krispan

kapon sur ekzekutan ŝtipon! Li mortis virece, kredu, kiel vera kristano."

Ne unu okulo ekrosis, kiam la karcer-gardisto tion rakontis. Malgaje la praganoj revenis kaj rerigardis la silentan Daliborka.

Kaj la turo post la burgafa domo apud la malantaŭa kastela pordego nomiĝas tiel ĝis la nuna tempo kaj konservas memoron pri la malfeliĉa etnobelo kaj glora muzikanto.

1) Tiel estis nomata la reĝa kastelo sur Hradčany.

2) Tiam la Nova, nun Pulvo-turo, fondita en la jaro 1475. Ĝin komencis konstrui la fama Matiaso Rejsek el Prostějov.

3) Halo Vladislaa.

4) Arestitoj tiutempe devis prizorgadi al si nutraĵon mem. Kiu ne havis por ĝi, al kiu amikoj kaj konatoj ne helpis, tiu suferis malsaton. Por tiaj malriĉaj arestitoj iradis peti sbir-edzinoj. Ie la arestitoj estis kondukataj de domo al domo en ĉenoj kaj katenoj, por almoze elpeti la manĝaĵon. Ankaŭ ili elpendigadis saketojn kaj pendsaketojn el la karcer-fenestroj kaj en tiujn kompatemaj homoj enmetadis diversajn donacojn.

**Bonan Kristnaskon kaj prosperan novan jaron!**

KLUB ESPERANTISTŬ V BRNĚ

c/o Miroslav Malovec

Bosonožská 15/10

625 00 Brno